

sub aŭspicio de MONATO, internacia magazino sendependa
Gvidantino: S-ino Audrey Childs-Mee, van Heusdestraat 88,
NL-3023 RX Rotterdam, Nederlando

473
1.3.1988

Helpe al la lingvo-uzo en 'Monato'

Unu el la celoj de KERNO estas funkcii kiel debatejo, kiu utilis por la lingvo-uzo de 'Monato'. Konforme al ĉi tiu celo, s-ro Fernand Boyet, Francio, sendis kelkajn rimarkojn pri la lingvo-uzo en 'Monato'. Ĉi tiuj rimarkoj prilumigas problemojn, kiujn frontas ne nur la redaktoroj, sed ankaŭ provlegantoj kaj kompostistoj de Esperanto-revuoj. Studante la rimarkojn, vi konstatos, kiel grave estas, ke fakajn artikolojn kontrolu sperta esperantisto, kiu estas samtempe spertulo en la koncerna fako. Tiu kontrolo okazu antaŭ la forsendo de la artikolo al la redaktoro!

Kutime nek redaktoroj, nek provlegantoj, nek kompostistoj de revuoj estas fakuloj pri ĉiu temo. Ili devas esperi, ke la verkintoj de fakaj artikoloj estas mem veraj spertuloj en la koncerna fako,

kaj havas sufiĉe altan nivelon de lingvo-kompreno kaj -uzo por kompetente elekti ĝustajn fakajn vortojn. Des pli en Esperanto gravas la lingvo-kompreno de la verkantoj, pro la ofta bezono eltrovi vortojn ankoraŭ ne en la Esperanto-vortaroj.

Kiam temas pri artikolo verkita en Esperanto de ne-eŭroplingvano, tiam la problemo estas la influo sur ies Esperanto-uzadon de la strukturo kaj logiko de ties gepatra lingvo. Kvankam tiu influo estas plej evidenta ĉe ne-eŭropanaj esperantistoj ankoraŭ ne sufiĉe lertaj-spertaj en la uzo de Esperanto, ĝi montriĝas ankaŭ ĉe eŭroplingvanoj. Ĉi tio elstarigas la konsilindecon kontroligi siajn verkojn per alilingvano, ankaŭ se oni estas mem denaska parolanto de unu el la diversaj eŭropaj lingvoj.



Pri lingvaĵoj en 'Monato' 2/86

de Fernand Boyet

Unue mi diros, ke tre ĝenerale la lingvo estas bona, ke kelkfoje la preseraroj evidentas, sed en aliaj kazoj mi dubas, kaj pri tio mi skribos.

1) Artikolo pri vulkanoj (p.7/8):

La artikolo estas interesa kaj estos instrua por la homoj, kiuj ne multe scias pri geologio. Por mi, kiu jam lernis geologion, estas alia problemo. Mi tute ne intencas detale rimarkigi pri tio aŭ alia detalo - mi bezonus por tio multe da teksto - mi nur deziras atentigi pri kelkaj terminoj:

a) 'faltmontaro' ŝajnas al mi pleonasmio, ĉar en ĉiuj montaroj la terenoj estas faltitaj. (Reciproke en plataĵoj la terenoj povas esti, jes aŭ ne, faltitaj.)

b) 'La amerika kaj pacifika platoj ŝoviĝas sub la kontinentan amerikan platon ...' La frazo estas konfuza; kiuj platoj subŝoviĝas? Laŭ miaj konoj pluraj platoj (sub la pacifika oceano) pacifika plato, kokosplato, kaj kazkaplato (en 'Monato' Nazca?) ŝoviĝas sub la tri amerikajn platojn: nordamerikan, karaiban kaj sudamerikan.

c) 'basaltiĝas' ĉu estas neologismo? ĉu estas preseraro por 'basaltiĝas'? En tiu lasta okazo, la termino ne taŭgas, ĉar kiam magmo fariĝas lafo ŝanĝiĝas fizikaj karakteroj sed konserviĝas la kemia konsisto. Fakte bazalto povas naskiĝi nur de magmo laŭ gabro-familio kaj en tiu okazo ne estas eksplodoj.

ĉ) 'turniĝintaj vulkanoj' De-nove, mi ne komprenas. Temas nek pri la preskaŭ plataj vulkanoj de Havaja tipo, nek pri konusformaj vulkanoj, ĉar neniam turo estis konusforma. Mi konstatas, ke la aŭtorino ne aludis pri vulkanoj, kies lafoj estas tute firmaj kaj pintas en la ĉirkaŭaĵo. Oni povas citi la faman vulkanon en Martiniko kaj ankaŭ multaj vulkanoj de franca centra montaro kiuj estas nomataj franclingve 'puy' aŭ 'dômes' (apud urboj 'Le Puy' kaj 'Clermont-Ferrand' ĉefurbo de la departemento 'Puy-de-Dôme'). Tiuj vulkanoj, kies esperantan nomon mi ne konas, havas formon de pinta turo sed ne konsistas el 'alternaj tavoloj de polvo kaj lafo'. Do, verŝajne estas malĝustaĵo en la artikolo.

2) Foiro pri fiŝado uzos Esperanton (p.23):

Mi ne komprenis la vorton 'split-glaci-produktiloj'; splito estas tranĉranda peco de rompitaĵo; ĉu oni devas kompreni, ke la aparato kreas blokojn el glacio, kiujn ĝi poste dissplitigas? (Kial la pecoj devas esti tranĉrandaj? ĉu por vundi la manojn de la laboristoj?)

3) Misiado, Korea romaniko (p.23):

a) 'staturon' en 'influis korean budisman staturon' ĉu ne estas preseraro por 'statuaron', ĉar mi ne komprenas kiel arto povus influo al la alteco de la homa korpo?

b) 'ekmetiigo' Oni povas legi, ke iu episkopo venis al Koreio en 1890. Li preparis konstrui bazilikon dum dek jaroj (do ĝis 1900)

kaj invitis arkitekton kaj plenumis la konstruaĵon en 1926, kvar jaroj post la ekmetiigo. Do la ekmetiigo okazis en 1922, tio estas 22 jarojn post la fino de la preparo; kio ĝi estas? ek-meti-igo? Laŭ la reguloj, la ĉefa parto estas 'meti/o' t.e. manlabora profesio. En la uzo de 'ig' kun tiaj radikoj: 'glaciigi, rajtigi ...' ig = fari ke io estu, ekz. fari tiel, ke akvo estu glacio. Do, en nia afero, temas pri ago kiu faras de 'io' (?) metio!! Oni ne citas verban formon de la radikoj, kio estas 'meti-i'? Laŭ la kunteksto, oni povas imagi 'ekkonstruon' (sed la uzata vorto tute ne taŭgas). Pretere, mi substrekos: 'preparis konstrui' kiu estas ne-kutima uzo de infinitivo.

c) 'tegmentbalkoj' kaj traboj 'flugliniaj'. La vorto 'balko' ne estas en vortaroj, kaj mi ĝin ne komprenas. Kaj 'fluglinio' = linio de flugo, kiu estas kutime vojo sekvata de flugmaŝinoj kiuj regule transportas pasaĝerojn. Mi ne komprenas kiaj povas esti traboj, kiuj pensigas pri linioj de flug-entrepreno.

ĉ) la malaperinta templeto. Mi tute ne komprenis la frazon: 'Nun, la templeto ... Ekonomia Kooperacio 1965.' Unua obstaklo: la 'japanaj paganaj sektoj kiuj adorigas koreanojn al japanaj imperiestroj kaj siaj dioj'. Mi unue rimarkas la uzon de 'koreano' kun 'Koreio' en la sama artikolo. Tio tute kontraŭas al la konsilo de la akademio en la sama numero de 'Monato' (p.6). Oni rajtas elekti inter 'Koreo' kaj 'koreano' (en Aktoj de Akademio 1968-1973) aŭ 'koreo' (loĝanto) kaj 'Koreio' (lando). Sed multe pli grava estas la uzo de la du komplementoj: unu akuzativa, la alia 'dativa' kun 'al'. En la frazo: 'Mi skribigis leteron al mia frato' la signifo estas: 'mi agis tiel, ke mia frato skribis leteron'. La sama skemo, ĉi tie montras, ke la japanaj sektoj agis tiel, ke la imperiestro adorigis la koreanojn (evidente la

Oni uzu fakajn terminojn, esprimojn kaj nomojn - sed nur fake!

Post verkado de mia eseo "Kiel fake kontroli tekston" (Akademio, Studo, 1986, pĝ. 88-89), en kiu mi malfavore kritikis la lingvouzon en artikolo titolita "La pratempoj de Malto" (Monato, 10/84, pĝ. 31-33), alvenis reago de s-ro Carmel Mallia, la aŭtoro. Li konfesis, ke eraroj enŝteliĝis en lian verkon, sed li provis defendi sin, argumentante, ke li ne estas arkeologo, kaj lia intenco ne estis verki fakan artikolon sed nur informan eseeton. Sekve, li opiniis nejusta mian analizon de la enhavo de lia verko laŭ la normoj de fakaj verkoj. Ĉar mi sammaniere kritikis la riproĉindan lingvouzon de Renato Corsetti (Heroldo de Esperanto, 1985, 4-5 (1743-44), pĝ. 7), li eĉis la saman rekantaĵon: "mi ne celis verki arĥeologian artikolon, sed nur ĵurnalisman rakonton por aliaj simplanimaj esperantistoj kiel mi ..." (Heroldo de Esperanto, 1985, 9 (1748), pĝ. 4).

Mi ne samopinias kun s-roj Mallia kaj Corsetti. En Esperanto, same kiel en ĉiuj etnolingvoj, ekzistas diversaj niveloj de lingvouzo, ekzemple la komunuza lingvo, la literatura lingvo, la slango, kaj ankaŭ la faka lingvo. Literatura vorto kutime diferencas disde sinonimoj en la komunuza parto de la leksiko pro siaj apartaj nuancoj, kiujn beletristoj trovas utilaj, eĉ necesaj, por plej efika sinesprimado. La plej grava trajto de la faka lingvo estas la preciza signifo, kiun havas ĉiu termino en limigita kaj specifa kunteksto. La slango plej ofte troviĝas en la efemera parola lingvo. Literatura vorto en kunteksto de la komunuza lingvo povus krei komikan efikon. Faka termino povas esti uzata ep nefaka kunteksto, sed ĝi ne perdas sian fakan esencon. Ĝi devas esti uzata fake, eĉ se la verko estas direktata al nefakuloj. La semantika enhavo de faka esprimo daŭre restas kun ĝi kiel la ombro de persono aŭ objekto. Sekve de tio, kiu uzas fakajn vortojn,

ĉu en infanlibro, ĉu en krucvortenigmo, ĉu en doktoriĝa disertacio, devas informiĝi pri la preciza signifo kaj la ĝusta formo de la koncernaj terminoj. Neniu duaranga lingvouzo estas tolerebla! Plue, oni ne rajtas inventi siajn proprajn fakajn vortojn (la sola escepto eble estas en la sciencfikcia genro), se jam ekzistas akceptitaj terminoj. Laŭ la vidpunkto de la nuntempa internacia arkeologia nomenklaturado, kelkaj el la terminoj troveblaj en la artikolo pri Malto estas evidente malĝustaj en iu ajn kunteksto.

La samaj rigoraj lingvaj kaj fakaj kriterioj estas aplikeblaj ankaŭ al la formoj de propraj nomoj en la citita duarta artikolo de Corsetti, titolita "Niaj prapatrinaj: la etruskoj" (Heroldo de Esperanto, 1984, 12 (1735), pĝ. 3, kaj 13 (1736), pĝ. 3). La plejmulto de tiuj nomoj havas ne nur la sankcion de Plena Ilustrita Vortaro, sed ankaŭ de aliaj Esperantaj konsultverkoj kaj la uzado de laikaj kaj fakuloj. Per la enkonduko de deviaj formoj, Corsetti semas konfuzon kaj evidentigas sian malfakulecon sur la lingva tereno.

Mi ne verkis miajn eseojn kun la celo ataki Monaton, Heroldon aŭ la aŭtorojn de la cititaj artikoloj. Mia intenco estis atentigi la tutan esperantistaron, ke post cent jaroj, la nivelo de lingvouzo en Esperantujo ankoraŭ ne estas kontentiga. Mi trovis same subnorman lingvouzon ankaŭ en aliaj publikaĵoj kaj atentigis pri tiu situacio. Bedaŭrinde, la redakcioj ofte preferas strute fermi la okulojn kaj orelojn kaj ŝajnigi, ke la lingvouzo vere ne estas malĝusta, ĉar temas pri stilaj apartaĵoj de aŭtoroj aŭ pri komposteraroj, kiujn legantoj de presprovaĵoj preteratentis. Kiel mi provis demonstri ĉi-supre, same ne-defendebila estas la preteksto de tiuj aŭtoroj, kiuj verkas laike pri fakaj temoj.

Bernard Golden (H)

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

"Ĉi verketo ... por avangardaj literatoj ... en sia nuna definitiva formo ... estas nemalhavebla aldono al PIV kaj valora minejo por verkistoj kaj tradukistoj" anoncas ĝia lastkovrilpaĝa reklamo.

Ĉi estas fascina kolekto de novismoj, pri kiuj la kompilinto skribas: 'Pri la akceptado de tiu aŭ alia radikoj, mi ne sentas min sufiĉe aŭtoritata por mem decidi. Tion faros la responsaj uzantoj.'

Mistifikemaj skribantoj al afrikanoj-komencantoj tre aprezos la laŭteman klasifikon, kiu sekvas la glosaron; la komencantoj ricevintaj (donace) la verketon, tamen eble decidus lerni la francan.

Kun siaj listoj de fontoj kaj verkoj, ĝi estas tre utila verko por kaj seriozaj kaj diletantaj esperantologoj, kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la etimologio kaj evoluo de la lingvo. Por ĉi tiuj KERNO proponas konkurson:

Konkurso de KERNO

Jen listoj de a) 20 vortoj el la 2 000, kiujn Henri Vatré ĉerpis el 105 gravaj verkoj, kaj b) iliaj signifoj. Kunligu ĉiun vorton kun ĝia signifo. (Rajtas partopreni en la konkurso ankaŭ posedantoj de Neologisma Glosaro kaj iliaj parencoj.) KERNO premias per laŭdo kaj/aŭ per publikigo de komentoj senditaj de la gajnintoj! La vortoj sisteme elektigis laŭ hazardo.

- | | |
|-----------------|-----------------------------------------------------------------------------------------|
| a) 1. asplo | b) a) jardeko |
| 2. arivi | b) en la ĉeesto de |
| 3. baranko | c) monteto |
| 4. ciki | ĉ) alveni |
| 5. decenio | d) aĉa strato aŭ korto en malpura kvartalo; malriĉega duon-ruinigita kvartalo en Usono. |
| 6. eglogo | e) pafado al argilaj diskoj aeren ĵetitaj |
| 7. erst | f) birdo |
| 8. feŝa | g) saluti hinde, kunmanante tiel, ke la manplatoj komplete intertuŝiĝas |
| 9. fristiko | ĝ) barilo el interplektigantaj arbedoj |
| 10. heko | h) ekstremito, konvulsie ekskuigi |
| 11. holmo | ĥ) mallonga poemo en kiu dialogas paŝtistoj |
| 12. koram | i) frumango |
| 13. mido | j) 1. pelto el ŝafa felo 2. speco de rusa kringo |
| 14. nami | ĵ) tagmezo |
| 15. nulmen | k) ne pli frue ol; unue, nur; erste; nure; antaŭ ĉio; plej frue |
| 16. ola-podrido | l) pendanta lampo, kovrita per sferforma kloŝo, ordinare uzata en preĝejoj |
| 17. ornito | m) bela, eleganta |
| 18. oskuli | n) tamen |
| 19. skido | o) poto en kiu oni kuiras samtempe multe da diversaj bongustaj nutraĵoj |
| 20. slumo | p) kisi |

oni surŝutas areon per substanco, ne substancan sur areon; aliflanke oni ŝutas substancan sur areon, kaj multaj el ni vivadas supersutitaj de laboro.

Kial okazas, ke spertaj, kleraj, multjaraj esperantistoj kvazaŭ rutine misuzas vortojn?

Iuj diras: 'Pro influo de la gepatra aŭ alia konata nacia lingvo.' Aliaj: 'Pro nesufiĉa kontrolo de la semantika senco kaj gramatika karaktero de la vortoj.'

La unuan kialon kuracus nuligo de la dua.

Unu el la plej imitindaj kontribuantoj al MONATO estas Marjorie Boulton. Antaŭ kvin jaroj aperis artikolo de ŝi en la revuo SAT-AMIKARO, el kiu citindas la jeno:

"... Ni ofte ne scias, kion ni ne scias. Antaŭ nelonge, mi komencis skribi flornomon 'iriso', sed foliĉe mi ne plene fidis mian memoron, kaj kontrolis en PIV. Jen, la floro estas 'irido', 'iriso' ja estas Esperanta vorto, sed nomas parton de la okulo! Bela estus bukado da 'irisoj', 'rosmaroj', 'alizeoj' kaj 'fritilaroj', ĝis oni pli atente rigardis en vortaroj, ĉu ne? ..."

Kaj ne sufiĉas kontroli en dulingva vortaro. Se vi verkas por ekskludi legantojn en netranspagipovaj landoj, sufiĉas kontroli en PIV, sed se vi verkas por tutmonda legantaro, kontrolu nepre en PV. Se vi ne kapablas verki sen uzo de vortoj netroveblaj en PV aŭ ties suplemento, almenaŭ aldonu klarigon por la leganto.

En MONATO 1/88 pĝ. 24 legeblas konfeso de iu, kiu sen sufiĉa pripensado skribis leteron al komencanto en netranspagipova lando. Ĉi tiu ja posedas Plenon Vortaron, sed verŝajne tre malnovan sen suplemento. Legante la plendojn de sia korespondanto, la unue skribinto certe konstatis kiom malsaĝe li agis uzante la priplenditajn vortojn en letero al komencanto el ne-hindeŭroplingva kulturo, kaj mi kore gratulas lin, ke li pretis publike agnoski sian malsaĝecon, cele al atentigi aliajn pri la problemo. (Parenteze, vi eble miris pri la lingvo-nivelo de unujara lern-

into, sed mi konas jam unu esperantiston en Afriko, kiu post unujara studado same bele uzis la lingvon.)

Profitige korespondi kun komencantoj, kiuj ne ĉiuj brilas kiel s-ro Kome Ncanto, estas vera arto, kaj meritas esti temo de altgrada kurso.

Estas dubo, ĉu ni iam tute forigas influon de nia unuelernita lingvo, kio evidentiĝas en la fremdlingvo-uzo de preskaŭ ĉiuj. Ankaŭ influas sur ĉi tion la plivastiĝanta malrespekto al lingvo kiel ento. 'Lingvo estas por komuniki, tial se mi sukcesas komprenigi min eĉ per mia aĉa kompetenteco en la (angl)a lingvo, tio sufiĉas; kial mi lernu plu? La vivo estas tro mallongdaŭra.' Tia estas la sinteno de la homamaso en la nuna plenŝtopita vivado. Evidentas, ke tiun saman sintenon havas multaj ankaŭ al Esperanto, kaj kulpas tiuj, kiuj nomas ĝin 'facila lingvo'.

'Facilan lingvon inteligentulo certe majstros post nur supraĵa lernetado, ĉu ne, kaj mi estas inteligenta do mi ne bezonas ĝin funde studi.' Se pruvon de tiu sinteno vi bezonas, akiru ekzempleron de la revueto de Espermenso, fak-grupo de Internacia Mensa, societo por inteligentuloj. Ĝin aktuale prilaboras, pro manko de spertaj volontuloj, bonvolemaj komencantoj - kiuj tamen dum pli ol du jaroj 'studis' la lingvon.

Esperanto estas multege pli simpla, (tial 'facila') ol iu ajn nacia lingvo, pro siaj planiteco kaj reguleco, sed la planon de ĝi, ĝiajn regulojn, kaj la signifon de ĉiuj ĝiaj eroj necesas kompreni por ilin ĝuste uzi - kaj tio postulas iom da peno eĉ ĉe 'inteligentuloj'.

La influo de revu- kaj radio-redakcioj sur la lingvo-uzon de la legantaro respektive aŭskultantaro estas grava: viduloj plej fidas je siaj okuloj, neviduloj je siaj oreloj. Influo implicas respondecon. Kaze de Esperanto, ĉar la plimulto de Esperanto-redaktoroj kaj provlegantoj nesalajrite plenumas siajn taskojn en liberaj horoj, tiun respondecon devas dividi la individuaj kontribuantoj. KERNO ekzistas por servi ne nur al redakcioj, sed ankaŭ al kontribuantoj al MONATO, kaj bonvenigas helpon-petojn pri lingvo-uzo same kiel helpon-proponojn.

sub aŭspicioj de MONATO internacia magazino sendependa

Gvidanto: S-ino Audrey Childs-Mee, Postbus 25041,
3001 HA Rotterdam, Nederlando

Cirkulero n-ro 7

Participa spritaĵo?

Erling Haugen (N)

PREZIDONTO (KERNO-cirkulero 6, pĝ. 3 'demandoj') Mi devas konfesi, ke kiam mi unufoje vidis tiun formon, mi kaptis ĝin kiel spritaĵon - ĝis mi trovis tute seriozan pledon por ĝi en unu el la sennombraj kontribuaĵoj pri la Esperanta participo.

Laŭ mia kompreno, 'prezidanto' estas unu el tiuj multaj ekzemploj de participoj, aktivaj kaj pasivaj, kiuj krom esti modalo ankaŭ havas la signifon: 'persono aŭ objekto kiu ordinare plenumas funkcion'. Kiam homo estas elektita prezidanto, tiam tiu homo estas prezidanto, eĉ se li aŭ ŝi ne aktuale funkcias, same kiel, ekz. elektita sekretario estas sekretario. Tiu, kiu estas nomita aŭ proponita prezidanto, restas kandidato, ĝis li aŭ ŝi estas elektita prezidanto. Aliaj particip-formoj en tiu kategorio estas: frajtanto, fumanto, atestanto, adresato ktp, ktp. Ankaŭ nomo de

plado en menuo apartenas al tiu kategorio en tiu kazo, ke oni volas mendi pladon eble ne jam pretan en la momento, kiam oni mendas ĝin. Ekz. batita kremo, poĉitaj ovoĵ... Iuj pledas en tiu kazo por: batota kremo, poĉotaj ovoĵ ...

Se oni kroĉas sin al komplika tempa aspekto, oni riskas turniĝi en malfacilajn, eĉ komikajn, situaciojn. Tial mi preferas rigardi plu la proponon 'prezidanto' kiel spritaĵon, kaj mi povus bone imagi al mi la redaktoron, kiu venas al nia kongreso: 'Pardonu, sinjoro, mi deziras intervjui la nov-elektitan prezidanton, sed mi dubas, ĉu mi devas nomi lin prezidanto aŭ prezidanto, ĉar mi ne scias, ĉu li jam funkcias!'

'Bedaŭrinde, mi ne povas efektive helpi vin, sinjoro; li ekfunkciis, kaj li prezidus, se li ĉeestus, sed ĝuste nun li forestas. Vi povas eble nomi lin prezidanto.'

Esperanto - misuzata lingvo

Audrey Childs-Mee (NL)

Leopold Knoedt, Brazilo, rimarkigas la emon ĉe siaj samlandanoj, kaj eble aliaj latinid-lingvanoj, misuzi la vortojn:

promocio; laŭ; priokupi; kompromiso.

Li atentigas, ke:

promocio havas solan signifon - rangaltigo. Ĝi neniel rilatas al antaŭenigo de var-vendado; "... en la bulteno anoncanta du brazilajn renkontiĝojn mi legas: 'promocio de ...' anstataŭ 'iniciato, aranĝo, organizo de ...'";

laŭ havas nur prepozician funkcion, ne konjunkcian;

priokupi ne estas 'zorgumi-maltrankviliĝi pri io';

kompromiso ne estas sindevontigo.

Ankaŭ ne-latinid-lingvanoj misuzas vortojn. Jen du lastatempe rimarkitaj:

el oficiala raporto: '... asistas la organizantojn ...'

asisti estas netransitiva verbo, kun la senco 'pro ofica devo ĉeesti por helpi al iu...' (PV); en PIV ĝi ricevas duan signifon, kiu tamen ne ŝanĝas ĝian netransitivan karakteron.

el diversaj artikoloj: '... surŝutas (salon) sur la (vojojn) ...'

aŭtoro opiniis la kontraŭon.)

Konklude, post diversaj korektoj, mi dediĉis multajn minutojn al tia deĉifro, sed fine: mi ne scias al kiu religio rilatis la detruita templo, mi ne scias, kiuj koreanoj aŭ ĉinoj vizitadis la templon, kaj mi ne scias, kie la koreanoj koruptitaj de la japanaj sektoj kultas al imperiestro de Japanio (en 1965!). Tia kaĉo estas tute ne digestebla.

4) 'Intensa terapio' mi notis la neologismon: 'vigilis', kion oni facile komprenas pro la latina radiko ... kiam oni estas eŭropano. Sed ĉu la vorto estas evidenta por ... koreano?

Kion konkludi pri tiu recenzo? Krom du 'eroj' en ordinaraj

Rumanio aŭ Romano?

En 'Aktoj de la Akademio II 1968 - 1974' troviĝas malgranda listo de landonomoj kaj landano-nomoj oficialigitaj de la Akademio. Inter la landano-nomoj troviĝas 'rumano', el kiu oni derivu la landonomon "per diversaj rimedoj laŭ la monda internacieco (sufikso -io, vorto lando, ktp.) aŭ per la Fundamenta sufikso -ujo."

El, do, Rumanio, skribis rumana profesoro, Toma Macovei, pledante, ke oni ŝanĝu la manieron decidi pri la nomo de lia lando kaj ĝiaj anoj. Li deziras, ke la landonomo estu 'Romanio' kaj la nomo de landano, por eviti konfuzon kun

artikoloj, la ĉefaj malfacilaĵoj troviĝas aŭ en sciencaj artikoloj kie la terminoj ofte mankas (mi ne trovis en PIV tradukon de la franca vorto 'andesite' lafo kies kemia konsisto respondas al la magmo 'diorito'. Tiu lafo estas la produkto de la Martinika vulkano kiu amase mortigis en 1902) aŭ en artikoloj kies aŭtoroj fremdas al Eŭropo. Mi memoras, ke en Inter-Monato, iu mokis pri la timo de disdialektiĝo de la lingvo, sed kiam mi provas, vane, legi artikolon similan al tiu 'misiado' kie temas pri balkoj kaj flugliniaj traboj, kie oni uzas inverse akuzativan kaj dativan komplementojn, mi dubas pri la universaleco de Esperanto.

ano de Romo aŭ kun la antikvaj romanoj, 'romano'. Li bazas siajn argumentojn sur la etimologio de la koncerna landonomo, la nuntempa lingvo-uzo en tiu lando, kaj la nomo de la lando en la ĉefaj (eŭropaj), precipe latinidaj, lingvoj.

Verŝajne estas jam tro malfrue por aliigi decidon de la Akademio, sed valoras atentigi pri la neceso funde esplori la etimologion ankaŭ de landonomoj, antaŭ ol proponi ekvivalenton en Esperanto.

Pri komputoro-komputilo - responde al la alvoko en KERNO-cirkulero 2

Fernand Boyet

Persone, mi uzas la vorton 'komputoro' kaj mi pravigas mian elekton per jenaj argumentoj.

1) Mi jam kutimis uzi la radikon 'komput/i' kun la signifo de PIV.

Laŭ la tezo de Lo Jacomo, 'Liber-eco aŭ aŭtoritato en la evoluo de Esperanto' (franclingva), tiu radiko estis en vortaro ekde 1923, kaj eĉ en 1909 Emile Boirac uzis

ĝin en la religia signifo: kalkuli la tempon por la kalendaro (temas pri latina radiko). El la difino de PIV komputilo estas aparato kiu el fizika, natura aŭ teknika fenomeno eltiras nombron. La diferenco kun 'nombri' estas, ke oni nombras apartajn estaĵojn; oni tiras nombron de kolekto (mi nomas kolekto ĉiun finian aron), kontraŭe, laŭ PIV komputante, oni tiras nombron el kontinua fluo.

2) La nova elektrona aparato ne kreas nombrojn el fizika fenomeno, sed ricevas mesaĝon (per literoj kaj ciferoj) tradukas tiun mesaĝon en elektronan memoraĵon, kiu estas registrita. Poste, per alia mesaĝo, la aparato uzas sian elektronan memoron por transformi la novan mesaĝon. La fakto laŭ kiu la 'lingvo' uzata por tiuj mesaĝoj, je la elektrona nivelo, estas la binara sistemo, kiu aspektigas la mesaĝojn nombroj, estas nur flanka afero. Cetere tiu flanka uzo de binara sistemo estas tute fremda al la latina radiko 'computo' = mi nombras, aŭ mi kalkulas. Konklude la latina radiko ne taŭgas, kial ne serĉi radikon en la lando kie evoluiĝis tiuj aparatoj, tio estas Usono, kies oficiala lingvo estas la angla. En tiu lingvo, la aparato nomiĝas 'computer'.

Laŭ la 15a regulo de la fundamenta gramatiko, oni devas adapti al Esperanto la fremdlingvan radikon. Mi opinias, same kiel multaj aliaj, inter kiuj la terminologia respondeculo de ISAE, ke la transpreno de la skriba formo de la angla vorto ne taŭgas, ĉar ĝi ne estas tiel parolata. Iuj, kiuj provis trovi la anglan prononcon, proponis la vorton 'komputro' (estis la unua opinio de Eichholz, kaj el tio Waringhien proponis la verbon 'komputri'). Sed mi opinias, ke la angla prononco ne estas internacia. Kiam la angla lingvo estas uzata en UNO aŭ alia inter-

nacia medio, ĝi estas prononcata tiel, ke la angloj ne komprenas, sed la fremdaj uzantoj bone interkompreniĝas. Tion diris antaŭ mi D-ro Ivo Lapenna. Do la vere internacia radiko estas nek 'komputer', nek 'komputr'. Laŭ mia scio, la francoj prononcas la finaĵon 'er' en la anglaj vortoj laŭ la modelo de la franca 'eur' (en 'coiffeur' = kombisto), kaj la germanoj imitas la prononcon de la germana vorto 'Lehrer'. Tiuj najbaraj sonoj ne ekzistas en Esperanto, sed la vokalo kiu estas la plej proksima estas 'o'. Tial mi opinias, ke la plej internacia radiko, elektinda laŭ la 15a regulo estas 'komputor'. El tio venas la substantivo 'komputoro' por la aparato kaj la verbo 'komputori' (=uzi komputoron), la adjektivo 'komputora' (ekzemple komputora instalaĵo) kaj la adverbo 'komputore': 'solvi komputore la problemon'.

Kompreneble, dank' al tiu nova radiko la radiko 'komput' restas por la nombrado el kontinuaj fluoj, kiu estas nek nombri, nek mezuri.

Flanka rimarko: Ekzistas aparatoj, kiuj ankaŭ ne produktas nombrojn, sed ricevas nombrojn kaj per elektrona sistemo liveras al la uzanto aliajn nombrojn (sed neniam literojn), kiuj estas aŭ sumo aŭ produkto ktp de la donitaj nombroj. Tiaj aparatoj estas nek komputiloj (laŭ la difino de PIV) nek komputoroj laŭ mia kompreno ĉi-supre klarigita, ili estas kalkuliloj (aŭ se oni deziras substreki la malsimplecon) kalkulatoroj.

Alia flanko rimarko: Mi difinis la komputorojn per la mesaĝoj, kiujn ili ricevas, konservas kaj transformas, konsekvence estas facile diri, ke ili rolas en informado, tial la scienco pri uzo de la komputoroj estas ĝuste nominda informadiko.